POR INFORMO

Strönne,
Ni proponas ke S.E.F. provizore cedas, atendante la 3-jaran periodon, kiam ni provos la novan statuton.
Kore
EA

TELEFONO: CHORLEY WOOD 138

SALA ESPERANTO-ASOCIO
(I.E.L. KAJ U.E.A. KUNIGITAJ)
CENTRA OFICEJO:
E, RICKMANSWORTH, (HERTS.), ANGLUJO

Sveda Esperanto Federacio,
S-ro Jan Strönne,
Amiralsgatan 36,
Malmö, Svedujo.

21-6-1948

Estimataj samideanoj,

Statuto

Ni danke ricevis vian voĉdonilon kaj notis vian proponon pri art. 10 - i.

Tiu propono ne estas nun traktebla. Se vi efektive deziras ke ni traktu vian proponitan aldonaĵon "kiu respektas la principon de Art. 4", tio indikas ke ni devos denove voĉdonigi la Komitaton, kaj se ĝi aprobus, denove okazigi ĝeneralan voĉdonadon. Tio donos multe da laboro, kostos al ni proksimume £25, kaj krome signifos ke estos senutile presigi la statuton en la dua parto de la jarlibro nunjara.

Cetere, ni opinias ke tiuj kiuj ne akceptas la proponon pri kiuj ili nun voĉdonas, ne akceptos ankaŭ vian proponon, ĉar la signifo estas preskaŭ la sama.

Ni sendas kopion de la nuna letero al S-ro Malmgren, kaj proponas priparoli la aferon kun vi en Malmö.

Kun samideana saluto,

Sekretario

peranto Federacio,
Strönne,
atan 36,
vedujo.
21-6-1948

j samideanoj,

Statuto

anke ricevis vian voĉdonilon kaj
an proponon pri art. 10 - i.

ropono ne estas nun traktebla. Se
ive deziras ke ni traktu vian pro-
aldonaĵon "kiu respektas la prin-
Art. 4", tio indikas ke ni devos
oĉdonigi la Komitaton, kaj se ĝi
denove okazigi ĝeneralan voĉdon-
donos multe da laboro, kostos al
imume £25, kaj krome signifos ke
utile presigi la statuton en la
de la jarlibro nunjara.

re, ni opinias ke tiuj kiuj ne
la proponon pri kiuj ili nun
, ne akceptos ankaŭ vian proponon,
ignifo estas preskaŭ la sama.

endas kopion de la nuna letero al
gren, kaj proponas priparoli la
n vi en Malmö.

Kun samideana saluto,

Sekretario

Malmö 13/7 1948.

Universala Esperanto Asocio

Anglujo.

Pri la statuto.

Sveda Esperanto-Federacio provizore cedas, kiam temas pri nia ŝanĝpropono (art. 10 - i).

Ni unue provu la novajn statutojn kaj poste ni vidu.

SEF nun uzis la eblecon diri sian opinion.

Al C.C.Goldsmith.

Koran Bonvenon al Malmö !

Via

Jan Strönne